

---

# la **Espero**

Falköping:  
laborkongreso  
por cento  
da svedaj  
esperantistoj

LA ESPERO  
SVENSKA  
ESPERANTOTIDNINGEN  
JUNI 1977

FONDITA EN 1913  
ISSN 0014-0694



4

Forlasis nin  
L. Sinha



# HODIAŬ

## Ĝisrevidaj vortoj

Ĉi tiu numero estas la lasta, kiun mi redaktas kiel ĉefredaktoro de La Espero. Mi forlasas tiun postenon ĉefe pro troa okupiteco, sed troviĝas ankaŭ aliaj motivoj. Mi transprenis la taskon en 1970, malsperta novulo, sed kun granda entuziasmo. Post sep jaroj la laboro fariĝis rutino, novaj freŝaj ideoj elĉerpiĝas. Kiam oni tion konstatas alvenis la tempo por rezigno.

Ne estis facile transpreni la redaktoran postenon de tia eminenta lingvisto, kia estas Tiberio Morariu. Kelkaj eble kritikis la enhavon de la gazeto dum lia redaktoreco — oni ĉiam faras, ĉar ne eblas al redaktoro plaĉi al ĉiuj — sed la lingvan nivelon neniu povis kritiki. La Espero ĝuis altan prestiĝon en la esperantomondo ĝuste pro sia lingva kvalito.

Feliĉe Tiberio Morariu dum la jaroj apogis min, kontrolante la tekstojn. Kaj mi baldaŭ trovis, ke kiam mi opiniis tekston lingve perfekta, li ankoraŭ trovis erarojn, eĉ gravajn. Kaj kiam, dum la lastaj monatoj, iu amiko skribis al mi, ke al li tre plaĉas la nuna aspekto de La Espero kaj speciale mia stilo, «kiu multe pliboniĝis tiel ke ĝi estas nun modela», la merito restas tute ĉe Morariu, kiu estis perfekta instruisto.

Ĉar estas amara sperto de redaktoro de revuo kiel La Espero, ke multaj esperantistoj, kiuj eĉ okupas gvidajn poziciojn en nia movado, traktas nian lingvon en terura maniero. Eĉ pri la akuzativo, kiu ja estas malfacila por svedoj, ili eraras. Mi opinias, ke tio estas por ni vere serioza problemo. La klarigo kompreneble estas, ke multaj el ni tiel frue devas dediĉi nian liberan tempon al poresperanta laboro, ke ni neglektas nian propran lingvan evoluon. Sed mi pensas, ke ni tiurilate faras gravan eraron. Ni propagandas lingvon, kiun ni pretendas esti pli facila ol iu ajn nacia lingvo. Sekve ni mem devas ĝin unue regi. Ni devas konscii, ke perfektigi en nia lingvo estas por ni, aktivuloj, tasko same grava, kiel la ekstera propagando. Ni devas dediĉi tempon al tiu tasko!

Redakti gazeton kiel La Espero estas stimulgiga tasko. Unue, ĉar ĝi estas krea laboro. La redaktoro kreas ion, ion por aliaj homoj. Due, ĉar oni devas atenti pri la kontakto kun la legantoj. Alvenas multe da sugestoj, multe da proponoj, multe da kritiko. Kaj oni povas eterne diskuti pri kiel aspektu la gazeto. Ĉu malpli da blankaj interspacoj, ĉu malpli da bildoj kaj pli da teksto, ktp. Sed la redaktoro havas la taskon per limi-

gitaj rimedoj, en limigita spaco, krei gazeton, kiu estas kaj interesa kaj allogaspekta. Estas neeviteble, ke la persona gusto de la redaktoro influas la finan produkton. Sed tiu redaktoro, kiu neglektas la opiniojn de la legantoj, estas malbona redaktoro.

Mi forlasas la ĉefan respondecon pri La Espero. Ĝin transprenas redakta komitato kaj persone mi opinias, ke tio estas bona solvo. Kaj mi estas feliĉa, ke oni min enigis en tiun redaktan komitaton. Ĉar, kvankam la sola respondeco estis dum la lasta tempo por mi tro granda premo, mi ekamis la gazeton, same kiel oni ekamas infanon, kaj mi volonte ankaŭ estonte provos kontribui al revuo, kiu estu por la svedaj esperantistoj kiel eble plej varia kaj interesa.

Åke Blomberg

# JES & NE

## Så här ser styrelsen ut

Efter årsmötet i Falköping ser styrelsen ganska annorlunda ut än i början av året. Dessutom är arbetfördelningen inom styrelsen förändrad. Det är därför befogat att lämna en fullständig adresslista på dem som är med nu. Varsågod:

**Jan Ströme**, ordförande  
Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö  
tel. 040-12 92 11

**Roland Lindblom**, viceordf.  
PI 3086, 140 40 Ösmo  
tel. 0752-421 43

**Ulla Luin**, sekreterare  
Mygdalsvägen 123  
135 00 Tyresö, tel. 08-712 82 91

**Märtha Andréasson**, vicesekr.  
2265 Tolsered, 425 90 Hisings  
Kärra, tel. 031-57 11 33

**Sven Alexandersson**, kassör  
Krokvägen 85, 122 32 Enskede  
tel. 08-49 80 24

**Franko Luin**  
Mygdalsvägen 123,  
135 00 Tyresö, tel. 08-712 82 91

**Bertil Åkerberg**  
Lillsvängen 39, 126 57 Hägersten  
tel. 08-46 29 95

**Linnea Edsenius**, suppleant  
Wilhelmsgatan 2, 382 00 Nybro  
tel. 0481-1 07 44

**Kerstin Rohdin**, suppleant  
Rosenborg, Box 5358  
702 21 Örebro, tel. 019-16 08 46

Titta igenom listan en gång till. Har du märkt att det råder en ganska bra balans mellan kvinnor och män i styrelsen? Äntligen!

## Esperantobroschyr på maltesiska

På ön Malta finns det också esperantister, med egen organisation. Den är inte särskilt stor och den har, som så många andra små organisationer, inte så gott ställt ekonomisk. För att hjälpa dem att sprida information om esperanto har SEF, med bidrag från några svenska föreningar, gett ut en informationsbroschyr på maltesiska, «Dwar l-Esperanto». Vi vet inte



vad det betyder, men det vet de på Malta. Du trodde kanske att det skulle gå med en engelsk broschyr på ön? Den här broschyren är nog ett bevis på att det inte gör det.



## La Espero

Organ för Svenska Esperanto-förbundet

Adress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Ansv. utgivare: Bertil Åkerberg  
Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping

Telefon: 0510 - 286 42 (arb. 0510 - 221 30)

I redaktionen: Anita Lindblom, Franko Luin, Geoffrey Sutton  
Prenumeration: 30 kronor per år, postgiro 20 12 - 3, Svenska Esperantoförbundet

Tidningen utkommer med 8 nr per år: i februari, mars, april, maj, september, oktober, november och december.

Manuslapp: den 10, månaden före utgivningsmånaden

Fotosats: Esperantoförbundet  
Tryck: Sturetryckeriet, Stockholm 1977



## Esperantoförbundet

Postadress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Besöksadress: Hägervägen 31

Telefon: 08 - 48 99 76

Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18 — 20.

Postgiro: 20 12 - 3

Medlemsavgift: direktanslutet medlem 30 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 15 kronor, familjemedlem utan tidning 10 kronor

Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperanton* ingår i medlemsavgiften.



## Esperantoförlaget

Postadress: Fack, 200 42 Malmö  
Besöksadress: Mölllevångsgatan 20 B

Öppettider: 1 sept — 15 maj: onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18

Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.

Telefon: 040 - 12 20 29

Postgiro: 578 - 5

Expedition: Anna-Greta Ströenne

Medhjälpare: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

## Bidrag till Sinhas minne

På annan plats i tidningen hittar du en nekrolog över L. Sinha. Från flera håll har styrelsen för SEF fått höra att vi bör på något sätt komma ihåg honom, t ex genom en insamling.

Styrelsen har diskuterat detta och föreslår att den som vill lämna ett bidrag till Sinhas minne gör det lämpligen genom att betala till UEAs «fondaĵo Canuto».

«Fondaĵo Canuto» är en särskild fond genom vilken esperantister från tredje världen och från länder med valutarestriktioner kan bli medlemmar i världsorganisationer. Fonden har fått sitt namn efter en tidigare ordförande i UEA.

Till fonden betalar du genom postgiro 14 74 29 - 5, Svenska Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö. Skriv på talongen «Fondaĵo Canuto, memore al L. Sinha».

## Paroli kun la tuta mondo

Ekzistas tutmonda klubo de homoj, kiuj deziras korespondi per sonbendoj aŭ kasetoj. Tiu klubo havas sian sidejoj en Usono, sed ĝiaj membroj loĝas en 34 landoj. Inter ili estas ankaŭ esperantistoj, kio jam estas interesa por ni. Sed la intereso estus ankoraŭ pli granda, se multaj esperantistoj partoprenus en tiu mondskala rondo. La jarkotizo estas tre malalta (nur kvar dolarojn) kaj por ĝi ĉiu membro ricevas: kompletan adresaron de ĉiuj membroj en la tuta mondo (la lasta havas 64 grandajn paĝojn) kaj ĉiun trian monaton interesan gazeton en la angla lingvo, kiu enhavas supplementon kun la adresoj de la novaj membroj. Mi ne dubas, ke se ĉiuj esperantistoj sciis, ke tiu klubo ekzistas, preskaŭ ĉiuj, kiuj posedas magnetofonon, aliĝus al ĝi. Tio havus du avantaĝojn: unue, multaj esperantistoj povus «parole» interkonatiĝi; due, la ceteraj membroj de la klubo, ĝis nun ne-esperantistoj, konstata, kiom vasta estas la uzo de esperanto, kaj multaj, serĉantaj homan kontakton sed ĝenataj de la lingvaj baroj, eklerne esperanton kaj venus al miaj vicjoj.

Por la esperantistoj kapablaj paroli aliajn lingvojn tio estas facila maniero fari propagandon por esperanto en medio tute preta akcepti ĝin.

La klubo nomiĝas *The Voice-spontence Club*. Tiu vorto sig-

## Adressaĝo!

Adresigu ĉiujn sendaĵojn al *La Espero* ekde nun al  
La Espero  
Fack  
S-122 04 Stockholm-Enskede

nifas «voĉa korespondado», laŭ la angla vorto «voice» (=voĉo).

La fakto, ke la adresaro kaj la kvaronaraj bultenoj estas en la angla, ne devas esti baro por esperantistoj, kiuj ne scipovas ĝin ĉar mi proponis al la sekretario de la klubo esperantistan kunlaboradon, kiun li entuziasme akceptis. Mi estas preparanta esperantlingvan tradukon de la dokumentoj de la klubo, kiun la peranto por kontinenta Eŭropo multobligos por la esperantistoj.

Hi estas tute pretaj akcepti nin: tiun okazon ni ne devas preterlasi. Tial mi konsilas al vi aliĝi al tiu tre interesa klubo kaj profoto ĝiajn servojn. Vi certe ne bedaŭros tion.

Se vi deziras pliajn informojn vi povas unue turni vin al mi, Daniel Luez, 1, rue Victor-Faglain, F-02000 LAON, Francio.

## Jarkunveno de seĵu

La23-an kaj 24-an de aprilo SEJU, Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, havis sian jarkunvenon en Gotenburgo. Tie ĉeestis proksimume 30 personoj. La plej grava decido de la jarkunveno estis akcepto de parta ŝanĝo de la statuto, kiu nun ebligas membrecon en SEJU ĝis aĝo de 30 jaroj.

Post la elektoj la estraro nun konsistas el Marianne Westman, prezidanto (tel 08-818559)

Derk Dam, vicprezidanto kaj redaktoro de ktp (tel 08-818559) Geoffrey Sutton, sekretario (tel 018-130105), Jan Setréus, vicsekretario (tel. 08-497791), Inga Johansson, kasisto (tel. 031-140273), Christer Fernström (tel. 08-7557889) kaj Jan-Olof Svensson. La jarraporto estas ricevebla ĉe la prezidantino.

## Alingsås raportas

La Esperanto-societo en Alingsås havas nur 15 membrojn, sed ĝi estas sufiĉe vigla. La agadraporto por 1976 rakontas, ke membroj de ĝi partoprenis en la internaciaj kongresoj de UEA, en Ateno, de IFEF, en Skellefteå, de SAT, en Gotenburgo, kaj ankaŭ la jarkongresojn de SEF kaj KEF.

La societo estas aliĝinta al ABF kaj NBV kaj gvidis po unu studrondon kunlabore kun ili ambaŭ.

## Västeråsklubben på Kungsörmöte

Västerås Esperantoklubb har förlagt ett av sina möten till Kungsör, där den också har medlemmar. Som särskild gäst var Ulla Luin från Tyresö med.

Mötet kom att handla mycket om kommande verksamhet, om information förstås men även om olika arrangemang.



Fotografen var också med i Kungsör

# Neŭtraleco: opinio de finna leganto

*Finna leganto de La Espero sendis al ni kelkajn pensojn pri la problemoj de neŭtraleco, kiujn ni volonte publikigas:*

Komence oni konsideru, kion signifas tiu iomete multe disputita afero kaj vorto «neŭtrala». Pri ĝi mi trovis verŝajne racian solvon en Plena Vortaro: «Neŭtrala — Ne partoprenanta en diskuto, disputo, batalo, milito: neŭtrala lando, —lingvo... Respekti la rajtojn de neŭtraluloj; la neŭtraligo de la intergentaj rilatoj estas la tuta celo de niaj laboroj». La lasta esprimo laŭ Zamenhof, kiu jam je la kreo de la Internacia Lingvo sentis ĝin unu el la ĉefaj motivoj en sia gravega laboro.

Oni devis tamen dum la pasintaj jar-

dekoj bedaŭrinde konstati, ke tiucelaj streboj en praktiko ofte ne multe sukcesis. Maturaj homoj ankoraŭ memoras, kiel grava oni taksis tendencan por «plena neŭtraleco» je la sfero de niaj Nordlandoj antaŭ la dua mondmilito. Surbaze de tio la finnaj politikistoj argumentis necedeman linion dum interŝtataj konsultadoj kun Sovetrusujo, kio influis tion, ke la normalaj rilatoj rompiĝis kaj sekve akriĝis ĝis la milito en la fino de la jaro 1939.

Nia tiama obstina pozo por la plena aŭtonomio kaj agado je la signo de ioma «pseudoneŭtralismo» fariĝis la faktoroj, kiuj kondukis Finnlandon en militan ŝtaton. Nur Svedujo en la nordo sukcesis konservi relative suverenan

ŝtaton; krom la geografia situacio konsekvenca pacpolitiko kaj sufiĉe gravaj ekonomiaj kaj militaj faktoroj ebligis tian rezulton.

La realeca orientiĝo de prezidanto Paasikivi kaj la pac-konserva linio de prezidanto Kekkonen dum la pasintaj jardekoj sukcesis krei novan, konfidencan atmosferon en Finnlando kaj ekster ĝi. Oni povas konstati, ke dume apenaŭ iuj etŝtatoj de la mondo povis agi kaj vivi sufiĉe suverene. Ankaŭ en iliaj internaj rilatoj neŭtraleco grave malpliĝis. Kontraŭe, fortikiĝis ĝenerale la signifo de diversaj prem-grupoj kaj partioj. Al individuaj civitanoj la idealo de neŭtralismo nur malofte ŝajnas ebla kaj racia.

Kia estas la situacio interne en la esperantomovado?

Niaj grupoj ankaŭ nun agas kaj pensas laŭ la interna ideo de la internacia lingvo. Kelkfoje esperanto-societoj estas ankaŭ laŭnome «neŭtralaj». Iliaj membroj kompreneble konsistas el tre diversaj unuopuloj, ĉar ne troviĝas du samaj laŭ menso kaj koncepto.

Oni povas ja taksii la fenomenon «neŭtrala» nur teoria, principa afero. Ĉu oni povas difini, kia estu la rolo de iu «ĝusta», «korekta» neŭtralulo? Verŝajne al ili ne konvenus aparteni al iu politika partio kaj ili eĉ ne rajtus paroli pri politiko. Studente gazetojn kaj abonante diversajn ĵurnalojn ili devus procedi senpartie.

En la praktiko eble neniam troviĝas ĝusta balancilo. Principe tamen la zamenhoha idealo povas montri al ni pravan linion, kiam ni elektas nian propran direkton. Neniu normala homo povas tamen resti neŭtrala, kiam temas pri strebado por paco kaj progreso.

E. R.

## Låt riksdagen inrätta ett esperantoinstitut

Tankarna under rubriken «Hodiaŭ» är sunda och sansade.

Det klokaste den svenska riksdagen kan göra i dag med avseende på esperanto är att inrätta ett esperantoinstitut med följande uppgifter:

### 1. Dokumentation och forskning

- inköpa esperantolitteratur och göra den tillgänglig för forskare
- inköpa viss språkvetenskaplig, samhällsvetenskaplig och pedagogisk litteratur, som behandlar de problem esperanto försöker lösa, och göra denna litteratur tillgänglig för forskare.



(a) sköts inte alls och b) sköts inte tillräckligt bra av universitetsbiblioteken).

c) undersöka och dokumentera esperantos ställning i utlandet.

### 2. Pedagogisk verksamhet

- rådgivning till skolor och lärare om hur esperanto och esperantoförningarna kan vara till nytta i skol-

arbete

b) rådgivning till skolor och lärare som vill ge undervisning i, om eller på esperanto

c) kurser för lärare och blivande lärare

d) framställning av läromedel

e) fortlöpande inventering av de personella resurserna för utökad undervisning i esperanto

f) insamla och granska information om inhemsk och utländsk försöksundervisning i esperanto.

### 3. Ta initiativ till och planera åtgärder till stöd för esperanto, om riksdagen finner lämpligt.

Argumenten för att man bör inrätta ett sådant institut är två:

1. Om riksdagen betraktar esperanto som något bra och värt att stödja, är detta förmodligen det billigaste (ca 100 000 — 150 000 kr per år), effektivaste och mest realistiska sättet att stödja det.

2. Om esperanto vinner en plötslig framgång utomlands, kan det vara av betydelse för Sveriges ekonomi och anseende, att här finns en viss beredskap, som gör en snabb anpassning möjlig. (Jfr t ex vår beredskap med den som finns i vissa länder i Östeuropa).

Ett sådant esperantoinstituts verksamhet kan sedan utvidgas om riksdagen så finner lämpligt. Det kan t ex planera esperantos införande som C-språk i gymnasieskolan.

An.

# SINHA

Tagore + Sinha!

Jen bonega kombinaĵo!  
Tagore verkis, Sinha tradukis.

**Malsata ŝtono**  
libro pri la vivo en Hindio. Lirika kaj profunde homa. Unua libro en la serio *oriento-Okcidento*.

Bindita 30,—

Esperantoförlaget

## Forlasis nin L. Sinha

Kun emocio ni ekscias, ke Lakshmiswar Sinha forpasis. Oni sciigas, ke la 22-an de aprilo je la 5-a horo posttagmeze li en sia hejmo Sinhagarh, Santiniketan, Hindujo, en sia 73-a vivjaro trankvile transiris la vivon inter vivo kaj morto. Haltis tiam amanta koro kaj endormiĝis eterne unu el la plej noblaj homoj vivintaj.

Dum la lastaj jaroj de sia vivo Lakshmiswar Sinha suferis fizikan nekapablon, sed spirite li kiel ĉiam estis juna kaj forta kaj sin okupis multe pri verkado kaj observado de la ŝanĝanta socia strukturo de lia kara Hindujo, al kiu li dediĉis sian vivon, batalante por la plibonigo de la vivkondiĉoj de la homoj en mizero.

En sia profesia laboro Lakshmiswar Sinha estis instruisto kaj organizanto de lerneja sistemo, en kiu unu parto de la edukado estis teoria kaj alia parto profesia, praktika manlaboro. Tiun novtipan edukistemon siatempe iniciatis en Hindujo Mahatma Gandhi kaj Rabindranath Tagore. Kaj al Lakshmiswar Sinha estis donata la granda tasko realigi la planojn. Dum kelkaj jaroj li tiam en Svedlando studis kaj lernis slojdon kaj reveninte al Hindujo li penadis aplikigi sian scion kaj povon tiurilate kaj al la edukado de instruistoj kaj al la enkonduko de slojdo en vilaĝaj lernejoj. Por Lakshmiswar Sinha la situacio estis unika en tiu senco, ke li intime kunlaboris kun Tagore kaj Gandhi kaj havis la benon de ambaŭ.

En membiografia libro «Jaroj sur tero», eldonita en 1966 de Eldona Societo Esperanto, Lakshmiswar Sinha rigardis malantaŭen al sia agoplena, pena sed ankaŭ riĉa vivo. Rekte kaj simple li rakontas en sia libro pri siaj infanjaroj en hinda vilaĝo, pri siaj revoj kiel junulo, pri la forta emo kaj deziro helpi al homoj en mizero kaj kiel pere de religia kaj filozofia gvido li konvinkiĝis je la celo de la homa vivo sur la tero.

Dum sia tempo en Svedlando Sinha esperantistiĝis kaj tio malfermis al li la pordon al svedaj koroj kaj hejmoj. En sia libro li ankaŭ emfazas la grandan utilon, kiun li spertis de esperanto. Li restis fidela al la ideo de internacia lingvo kaj al esperanto dum sia tuta vivo, kaj li multe laboris por nia lingvo kiel prelegisto kaj kiel verkisto de originalaj libroj en esperanto.

En sia homaranisma grandeco Lakshmiswar Sinha en sia religia koncepto kunfandis la plej bonan el hinduismo kaj kristanismo. Lia religio estis esence religio de sindona amo kaj profunda kredo je progreso de la bonaj elementoj en la homa animo kaj en la socia evoluo.


Laŭ hindua rito oni la saman nokton de forpaso plenumis la lastajn dezirojn de Lakshmiswar Sinha kaj en procesio portis lian nevivnan korpon al



L. Sinha kiel multaj memoras lin...

la granda arbo, sub kies branĉoj siatempe Maharshi Devendranath Tagore kutimis mediti. Post tiu lasta adiaŭa tuŝo je la sankta loko la procesio pluiris al la templo por lasta vizito, kaj reveninte de tie oni cindrigis la korpon de Lakshmiswar Sinha per fajro.

La 12-an de majo okazis granda ceremonia funebra kunveno ĉe la hejmo de la mortinto, kaj kvarcento da perso-



...kaj dum siaj lastaj jaroj

noj el Santiniketan kaj la vilaĝo Bolpur ĉeestis honore al la forpasinto kaj lia familio.

Lakshmiswar Sinha ne plu estas inter ni. Grandanima, genia kaj bonkora homo por ĉiam forlasis nin. Kune kun la familio kaj la geamikoj la esperantistaro tutmonda funebras. Ni memoros lin kun altestimo, honoro kaj amikeco.

**Victor Janheim**

## Li atingis 96 jarojn

Teodor Julin, eksestrarano de SEF kaj honora prezidanto de Grupo esperantista de Stockholm, forlasis nin por ĉiam la 18-an de majo 1977 en la aĝo de 96 jaroj.

Teodor Julin naskiĝis en Säter, Dalekarlio, la 31-an de oktobro 1880. En 1899 li eklaboris ĉe la poŝto. En 1903 li faris abituriantan ekzamenon, post kio li servis en pluraj lokoj, inter alie kiel notario ĉe la centra poŝtdirekcio, kaj fine kiel poŝtoĉefestro en Stockholm 9 kaj Stockholm 20 ĝis 1945, kiam li pensiĝis.

Krom sia poŝta laboro li estis dum la jaroj 1913 — 1917 redaktoro de la revuo *Svenskt Postarkiv* (Sveda Poŝtarkivo). Dum la jaroj 1920 — 1930 li apartenis al la sveda parlamento, kiel senatano. Depost 1932 li estis ĉefredaktoro kaj respondeca eldonanto de *Svensk Trafiktidning*.

Sur la esperanta kampo li faris multon. En 1928 li fariĝis esperantisto en kurso aranĝita por parlamentanoj de pastro Cseh. Li estis interalie prezidanto de Loka Komitato por la 26-a Universala Kongreso de Esperanto en Stockholm en 1934. Post la UK de Malmö en 1948 li aranĝis postkongreson en Stockholm. Kune kun sia edzino li aranĝis multajn kursojn en la popollernejoj. Li sperte gvidis la landan propagandon de nia federacio kaj ni ŝuldas al li la realigon de speciala sveda kaj ro.



Teodor Julin

«Ke li restu longdaŭre apud ni, por ke ni respektoplene povu peti de li la taŭgajn konsilojn de sperta interligiŝtisto». Tiel skribis Petro Filliâtre, redaktoro de *La Interligilo* en 1950 je la 70-a datreveno de la naskiĝtago de Teodor Julin. Kiam iu iĝas 70-jara li ja ofte estas rigardata kiel pensiulo, iu kiu ne plu taŭgas en la ordinara laboro. Sed Julin pruvis la malon. Li restis aktiva kaj partoprenis en la laboro de sia profesio kaj por esperanto ĝis kiam li estis pli ol 90-jara.

Kiam mi kaj mia edzino vizitis lin la 28-an de aprilo en la malsanulejo de Åkeshov, li ankoraŭ estis vigla kaj eĉ povis iri sen apogilo.

Ni memoros nian diligentan kunlaboranton kaj amikon kun admiro kaj dankemo.

**Bertil Åkerberg**

La jarkongreso de SEF en Falköping okazis en la koro de unu el la plej malnovaj kulturaj regionoj de Svedio, kaj dum la kongreso kaj ekskurso oni multe parolis pri historiaj memoraĵoj. Eĉ apud la kongresejo mem, nur kelkajn paŝojn for trans la strato, oni povis rigardi kvin miljaran dolmenon.

Kaj la kongreso mem? Ĉu ankaŭ ĝin regis la memoroj pri tempoj pasintaj? Maljuniĝintaj pioniroj, kiuj renkontiĝis por komune memoriĝi pri epoko, kiam la sveda esperantomovado estis pli forta kaj pli vigla?

Verdire renkontiĝis dum tiu ĉi jarkongreso en Falköping homoj, kiuj aktive laboris en la antaŭmilitaj jaroj kaj la tujaj postmilitaj jaroj. Sed multaj el ili estas ankoraŭ plene aktivaj kaj junecaj, kaj feliĉe troviĝis inter la kongresanoj ankaŭ pluraj junaj kaj novaj vizaĝoj. Tie estis, ekzemple, Jan-Olof Svensson el Tidaholm, kiu modele servis ĉe la stando de Eldona Societo Esperanto, kaj kiun mi neniam antaŭe renkontis, kaj Inga Johansson, kiu estis bona helpo al Ingvar Eriksson, la prezidanto de LJK, ĉe la praktikaj aranĝoj ĉirkaŭ la kongreso.

#### Praktikado konvinkas

estis la temo de la instiga parolado de Lennart Åberg, malnova pioniro, kiu restas eterne juneca, kaj oni eble rajtas konstati, ke tio fariĝis la temo de la tuta jarkongreso. Lennart Åberg prezentis ĉefe du ekzemplojn pri kiamaniere oni povas utiligi esperanton por aliaj celoj, tiel konvinkante la homojn pri ĝia praktika valoro: la prelegserion de Justin Minani kaj la ekspozicion de infandeseĝnaĵoj en Tibro.

Justin Minani faris 30 prelegojn nur en gimnazioj, kaj li havis 7 470 aŭskultantojn. Li ne faris rektan propagandon pri esperanto; li parolis pri persekutoj, kiuj okazas en Burundio, lia hejmlando, sed li parolis en esperanto kaj Lennart Åberg lin interpretis, ne forgesante tion mencii. En Tibro la organizaĵo «Savu la infanojn» aranĝis, je iniciato de Stig Kinnander, internacian ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. La funkcioj de la organizaĵo estis unue skeptikaj, sed montriĝis, ke alvenis 526 deseĝnaĵoj el 19 landoj, kaj la ekspozicio estis granda sukceso.

#### Gruplaboro

Post la parolado de Lennart Åberg sekvis gruplaboro. Kelkaj partoprenantoj demandis al si (kaj al mi), ĉu estis saĝe en tiu unua tago — ĉar la gruplaboro okazis en la posttagmezo de la unua tago — kiam ili estis alvenintaj al Falköping, laĉaj post kelkfoje longa veturado, kolektigi ilin en streĉa grupa laboro. Sed aliaj akcentis, ke ĝuste grupa laboro, diskutoj en malgrandaj rondoj, donas eblecon al la ordinaraĵoj esperantistoj, tiuj kiuj ĝenerale ne levigas por esprimi siajn opiniojn dum la grandaj, komunaj kunvenoj, partopreni la diskutojn.

## Falköping: laborkongreso por cento da svedaj esperantistoj



Kongresanoj en agrabla kunestado

#### Laboro ĉe aliaj organizaĵoj

Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi rubriko estas kvazaŭ «ruĝa fadeno» tra ĉiuj raportoj de la grupoj je la resumado en la lasta tago: per laboro ĉe aliaj organizaĵoj — kiel faris Stig Kinnander en Tibro — ni konvinku la homojn pri la praktika utileco de nia lingvo. Io, kion mi kaj aliaj en privataj interparoloj pridemandis, estas la kunordigo de nia laboro, la utiligo de niaj venkoj. Justin Minani parolis al miloj da gejunuloj, sed neniu poste uzis la eblecojn plue interesigi ilin pri la internacia lingvo kaj la lingvo problemoj entute. La ekspozicio en Tibro estis granda sukceso, sed ĝi estas la verko de unu homo, kiu verŝajne ne sola kapablas utiligi la prestiĝon, kiun gajnis esperanto.

#### Malfermo

Pardonu la iom senordan raporton, ĉar fakte la parolado de Lennart Åberg okazis en la unua tago, tuj post la malfermo, sed la resumoj nur en la lasta, tuj antaŭ la ĝisrevida lunĉo. La raportoj de la laborgrupoj oni cetere surbendigis. Pri ili aperos pli ampleksa resumo en la venonta numero de *La Espero*.

Ingvar Eriksson, la prezidanto de LJK, bonvenigis la kongresanojn kaj rakontis, ke en tiu ĉi regiono okazis antaŭ jarcentoj multaj sangaj bataloj inter svedoj kaj danoj. Inter la danoj, li diris, verŝajne troviĝis la prapatroj de sinjoro Ströme kaj aliaj skaniaj, ĉar Skanio tiutempe estis dana provinco. Neniu nuntempe imagas militon inter svedoj kaj danoj, kaj tiu fakto pravas, ke eblas krei pacon inter popoloj. La esperantistoj ne estas tiel naivaj, ke ili kredas, ke internacia lingvo solvos ĉiujn problemojn, sed ni kredas, ke ĝi estas la unua kondiĉo por interpopola interkompreniĝo.

#### Bankedo

La komunumo Falköping montris sian malavarecon en la vespero, invitante la tutan kongresanaron al bankedo kun tre bongusta traktado. La komunumaj gvidantoj vere montris eksterordinaran intereson, ĉar ne malpli ol tri ordinaraĵaj reprezentantoj ĉestis la bankedon: la prezidanto de la komunuma estraro, Erik Andersson, la vic-prezidanto, samtempe prezidanto de ABF en Falköping, Bo Eriksson, kaj parlamentano Bengt Börjesson. Parlamentano Börjesson evidente ekhavis intereson pri nia afero, ĉar li revenis en la tria tago por aŭskulti la diskutojn. Mi ne povas memori, ke tio okazis pli frue dum iu jarkongreso de SEF. Bengt Börjesson krome apartenas al la plej aktivaj anoj de la sveda parlamento.

#### Jarkunveno de SEF

La jarkunveno okazis, kiel kutime, en la antaŭtagmezo de la pentekosta tago. Post traktado de la jarraporto sekvis elektoj. Anstataŭ Tomas Jansson, kiu

eksiĝis, elektigis en la estraron Roland Lindblom, Nynäshamn, antaŭe anstataŭanto. Du novaj anstataŭantoj estas Linnéa Edsenius, Nybro kaj Kerstin Rohdin, Örebro. En la elektopreparan komitaton eniris, apud Aino Åberg, Gotenburgo kaj Inga Petersson, Helsingborg, Tore Johansson, Kalmar, anstataŭ Nils Johansson, Norrköping.

El la diskutoj dum la jarkunveno ni menciuj tiujn pri gazeto. Kelkaj opiniis, ke estus pli bone havi tekston sur la unua paĝo anstataŭ bildoj, aliaj plendis, ke senditaj kontribuoj ne aperis. La ĉeestantaj redakciaj reprezentantoj notis la kritikon. Vidu, cetere, la artikolon de la eksiginta redaktoro en tiu ĉi numero.

#### Ekskurso

Bedaŭrinde la raportanto ne mem partoprenis la ekskurson, sed laŭ diroj de ĉiuj partoprenintoj, kun kiuj mi poste sukcesis paroli, ĝi estis perfekta. Tra unu el la plej belaj kaj plej interesaj regionoj de Svedio al la tre malnova preĝejo de Kungslena, kie estis deservo.

#### Nokta marŝo el Bredablick

Finiĝis la pentekosta tago per distra vespero en restoracio Bredablick, sur la deklivoj de Mösseberg, de kiuj oni vidas la tutan urbon Falköping kun ĉirkaŭaĵoj. Ingvar tre rekomendis, ke oni restu ĝis post la mallumiĝo (la aŭtobusoj foriris antaŭ la krepusko) por vidi la lumojn de la urbo de supre. Estis grandioza vidaĵo, sed tiuj kiuj restis, devis poste marŝi piede al la hotelo en la centro de la urbo. Al mi ŝajnis, ke estas multaj mejloj, sed Ingvar diris, ke estis nur unu kilometro.

#### Venontjare Uppsala

La jarkongreso en Falköping estis perfekta aranĝo. Urbo, ne tro granda, centriĝo je unu loko, bela ekskurso, perfekta loka gvidanto — nur la apero de



”En sak är jag övertygad om: det vore mycket värdefullt om alla ute i världen, och inte minst i vårt land, lärde sig esperanto. Därför att man därmed skulle kunna vidga kontakterna. Vad är det som gör att vi har svårt att få kontakt med varandra? Det är språksvårigheterna. Kan man bryta språkbarriärerna, ger det möjligheter till ett ökat samarbete och därmed också ökad förståelse mellan folken.”

Riksdagsman Bengt Börjesson  
under SEFs kongress i Falköping



Nur unu el la multaj desegnaĵoj

Ingvar Eriksson, ĉiam afabla, ĉiam gaje ridetanta, instigis la partoprenantojn al bona humoro. Ni sentis nin hejme en Falköping.

La venontjara kongreso okazos en Uppsala, je ordinara semajnfino en aprilo, ĉar oni volas provi, ĉu iun jaron eble eĉ pli sukcesos kongreso, kiu ne estas ligita al granda frusomera festo.

obo

## SINHA

Konatiĝu pli bone kun  
Lakshmiswar Sinha!

Legu en lia membiografia  
libro **Jaroj sur tero** pri lia  
infanaĝo, pri liaj revoj,  
pri lia forta deziro helpi  
homojn en mizero.

Broŝurita 20,—  
Bindita 25,—

Esperantoförlaget

Konstrui per

# YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



**YTONG AB**

YXHULT  
GRUPPEN

Iam estis spertulo pri komputoroj kiu estis neordinare sagaca kaj nomiĝis Elis Bengtsson.

Elis Bengtsson estis fama en sep parohoj kiel spertegulo pri komputoroj kaj fine la famo atingis ĝis la plej alta etaĝo de la imposta nubskrapulo en Stokholmo, kie la supera impostkolektisto loĝas.

Tiam la supera impostkolektisto vokis Elis Bengtsson al si kaj diris: "Aŭskultu sinjoro Bengtsson, ni bezonas vere bonan kaj ekstrakvalitan komputoron, kiu povas kalkuli ĉiujn impostojn en nia atingopovo. Ĉu vi povas preni sur vin la taskon konstrui tian komputoron?"

"Certe mi povas konstrui tian komputoron", diris Elis Bengtsson.

Kaj nun vi vidis, ke Elis Bengtsson komencis konstrui grandiozan komputoron kies egalajon ĝis tiam neniu vidis. Estis kolosa komputoro kiu kostis multajn miliardajn milionajn kronojn, sed tio ne gravis por la imposta administracio, kie mono abundas. Kaj la plej bona pri la komputoro de Elis Bengtsson estis ke ĝi tute ne estis tiel nepersona kiel ordinara komputoroj, ĉar Elis Bengtsson enmuntis etan ridon, kiun la maŝino ridis ĉiufoje kiam ĝi elpemis impostrepagon kaj etan ĝemon, kiun la maŝino ĝemis ĉiufoje kiam ĝi elpemis nepagitan imposton.

Ĉiuj estis treege imponitaj pri la komputoro de Elis Bengtsson, kaj la supera impostkolektisto diris dankon al vi Elis Bengtsson.


Nun estis tiel, ke Elis Bengtsson ja ricevis teruran amason da mono tiun jaron ĉar li fabrikis tiun ĉi komputoron, do kiam oni enigis la proprajn deklarojn pri la enspezoj de Elis Bengtsson en la maŝinon, la supera impostkolektisto staris apude kaj tordis avide la manojn por per propraj okuloj povi vidi la kolose grandan impostsumon kiun la imposta administracio reprenos de Elis Bengtsson pro liaj grandegaj enspezoj de la imposta administracio.

"Nun la maŝino de Elis Bengtsson supozeble forte ekĝemos", diris la supera impostkolektisto malice ĝoja.

Sed imagu al vi lian miron kiam la maŝino levis nekutime koran ridon kaj eligis gajan strieton pri la

# POR FINI

## La komputoro de Elis Bengtsson



imposto de Elis Bengtsson.

La supera impostkolektisto legis sur la strio ke Elis Bengtsson devus ricevi impostrepagon de sescent mil kronoj.

Nun la supera impostkolektisto superbolis pro kolerego kaj vokis Elis Bengtsson al si.

"Nu Elis Bengtsson", li diris per malfortigita voĉo, "kion signifas tio ĉi?"

"Mi ne scias", diris Elis Bengtsson kun senkulpa miemo, "sed unu afero estas certa, kaj tio estas ke komputoroj neniam mensogas, sed se ili donas malĝustajn informojn, tiam ili estas ĉi-okaze bonfidaj. Kaj ja ne eblas multe fari pri tia afero."

"Vi rimarkos ke oni povas", la supera impostkolektisto kriegis. "Bonvolu serĉi

la eraron kaj riparigu ĝin senprokraste!"

Elis Bengtsson iris al la komputoro, rigardis ĝin dum momento kaj fingrumis tie kaj tie, kaj poste li diris:

"Montriĝis, ke estas eta aĵo, plej interne en la maŝino, kiu hazarde oblikviĝis."

"Nu, kiom longe daŭros ripari tiun aĵon?", la supera impostkolektisto senpacience demandis.

"Ho", respondis Elis Bengtsson, "tio daŭros plurajn jarojn, kaj kostos miliardajn milionojn da kronoj."

Nun fariĝis tumulto vi kredis. La supera impostkolektisto raportis la aferon al pli supera impostkolektisto, kaj li siavice al la supera impostkolektisto en la reĝa palaco, kaj laste la afero venis eĉ al la registaro.


"Je-es...", diris la registaro, "ne eblas multon fari pri la afero. Ni ne povas elspezi miliardajn milionojn da kronoj por akiri tiujn bagatelajn sescent milojn de Elis Bengtsson."

Nun ja estis Elis Bengtsson kiu subite fariĝis riĉa kiel Krezo! Li aĉetis sep vilaojn en Djursholm, unu por loĝi lunde, unu marde kaj tiel plu, ĝis la semajno finiĝis, kaj li mangiis eksterordinare multekostan specon de porkoripaĵo kaj trinkis ĉe tio multon. Kaj pli kaj pli li riĉiĝis, ĉar la aĵeto plej interne en la komputoro plioblikviĝis ĉiujare. Lastfoje printempe la maŝino elridis impostredonon je naŭ milionoj okcent sepdek ses mil kvincent sesdek tri kronoj kaj dek unu oeroj por Elis Bengtsson.

Tial, kiam la registaro kulpigas la konjunkturojn tuj kiam iu ilin demandas kial ili neniam signife altigas la maljunaĝan pension, tiam nur estas sensencaĵo. Ne estas ordinara konjunkturoj kiuj elkranas big money el la ŝtata kaso, sed estas aparta specialkonjunkturo kiu nomiĝas Elis Bengtsson kaj estas neordinare sagaca.

## Tage Danielsson

El la libro "Sagor för barn över 18 år" de Tage Danielsson  
Tradukis Jan Sترéus, Derk Dam kaj Marianne Westman  
Aperas kun permeso de la aŭtoro.



— Kial vi gapas? Ĉu vi neniam antaŭe vidis centkvardek kilograman Julieton?